


QUANCO

3/05

JULIO - SEPTEMBRO

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO



Oficiala Organo de
Kuba Esperanto-Asocio
(3/2005, julio-septembro)
Aperas 4-foje jare

Eldonas:

Kuba Esperanto-Asocio
Poŝtflako 5120,
10500 Havano, Kubo
Telefonaĵoj: ++53(7)40 4484
Fakso: 643 8729
Retadreso:
avanco@esperanto.cu.cu

Ĉefredaktoro:

NORBERTO DÍAZ GUEVARA
norberto@ssp.desoft.cu

Revizias:

JULIÁN HERNÁNDEZ ANGULO
ALBERTO FIDEL CALIENES BARRIOS
MARTIJA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ
JUAN R. RODRÍGUEZ GÓMEZ

Enpaĝigo:

NORBERTO DÍAZ GUEVARA
ALBERTO FIDEL CALIENES BARRIOS

Reproduktado permesata
Interŝanĝo dezirata.

La kovrilo:

La novaj teknologioj kaj Esperanto: Studentino de la Universitato de Informadikaj Sciencoj en Havano, estonta programarinĝeniero, lernas Esperanton. La universitata E-klubo havas nun pli ol okdek membrojn. La ampleksa F-paĝaro allogas ĉiutage pli da interesitoj "kaj ili venas el ĉiuj provincoj... Nova generacio elanas. Foto: Calienes.

estimata leganto

En la nuna numero aperas la oferto de Avanco por la periodo julio-septembro de la jam finiĝanta jaro 2005, kaj mi invitas vin predebari kun Maritza ĉu la idealoj de Zamenhof (paĝo 3) restas plu validaj aŭ ne.

Materialo (paĝo 14) el la manoj de Marta helpas nin plialtigi nian lingvan nivelon; kaj ne protorpasu la erojn de popola scio (paĝo 12), por ke viaj okuloj ne restu kaŝitaj antaŭ viaj okuloj.

Plie, ankoraŭ blovas ventoj de la kuba kongreso, per la ĉeesto de la temo "Kutimaj eraroj de la kubaj E-parolantoj" (paĝo 6).

Agrablan legadon deziras, kun Avancaj salutoj.

NORBERTO DÍAZ GUEVARA

enhavo

Zamenhof-idealaj, ĉu plu validaj?	3
MARTIJA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ	
UK-oj: 100 jaroj de interkultura komunikado	4
JULIÁN HERNÁNDEZ ANGULO	
Interkultura komunikado en edukado	5
JULIÁN HERNÁNDEZ ANGULO	
Kutimaj eraroj de kubanoj parolante Esperanton	6
NORBERTO DÍAZ GUEVARA	
Eroj (kompilaĵo)	12
JULIÁN HERNÁNDEZ ANGULO KAJ NORBERTO DÍAZ GUEVARA	
Kiel altigi la propran lingvan nivelon?	14
MARTA ALONSO GUTIÉRREZ	
Cirkulero pri SAEST 2006	15

Informado / Instruado / Utiligo

Sur tiuj ĉi tri kolonoj baziĝas la ĉefaj agadoj de KEA. Ni volonte publikigas en niaj paĝoj viajn ideojn pri tiuj temoj. Bv. kontakti la redaktoron.

Zamenhof-idealaj, ĉu plu validaj?

Kiel parto de la esperantistaj tradicioj, decembro estas monato de Zamenhof-tago aŭ Tago de la Libro, kaj certe, tago de Esperanta celebrado tutmonde.

La kubaj esperantistoj havas jam ankaŭ tradician eventon nomatan Tutlanda Metiejo Zamenhof, kiu okazas en la plej orienta provinco, Guantánamo, kun abunda programo kiu ĉiam inkluzivas prelegojn pri la vivo de Zamenhof, ties pensaro kaj personeco.

Oni ne povas forgesi kiel rapide la tempo pasas kaj homaj kondutoj kaj problemoj daŭre iĝas similaj aŭ fojĝe eĉ pli evidentaĵoj kaj kontraŭdiraj. La lingva problemoj restas aktuala demando.

Kiam antaŭ pli ol unu jarcento Zamenhof publikigis la Unuan Libron, la internaciiganta mondo suferis la ne-interkomprenon inter la nacioj pro malsameco de iliaj lingvoj. Per esperanto Zamenhof celis faciligi la lingvan interkomunikadon.

Nuntempe, la malsameco de lingvoj plu estas la bazo de la lingva problemoj en la mondo, sed al tio aldoniĝas la tendenco altrudi etnan lingvon kiel efektivan komunan lingvon de la internacia vivo, kio portas kun si diversajn problemojn, i.a. la kulturalan altrudon. Sed la vera lingva problemoj en internaciaj forumoj kiaj UN kaj EU kuŝas ne en manko de interkompreno inter naciaj delegacioj pro ties lingva diverseco, sed en la efektiva komunlingviĝo de unu sola etna lingvo.

Maihelpi lingvan hegemonion estas nuntempe granda problemoj en la internaciaj organizaĵoj, kvankam ili ne emas oficiale agnoski tion. Ili estas sub premo trovi taŭgan solvon. En la kazo de EU tiu solvo povus esti ŝlosilo al efektiva eŭropa unuiĝo kio esperigas multajn homojn pri ŝancoj por esperanto en Eŭropo.

Aliflanke, evoluis faktoj pozitivaj pri reciprokaj rilatoj kun institucioj eksterasociaj kiel UN kaj Unesko. Kiam Unesko renovigis la rilatojn kun UEA, Federico Mayor pravigis tion i.a. per la graveco de la inform-rotaj de UEA por "disvastigi la mesaĝon de Unesko kaj antaŭenigi ĝiajn idealojn".

Ni mem, esperantistoj, emas ofte subtaksi tiajn rilatojn unuflankaj. Ni emas pensi, ke ili gravas nur por povi pledi por nia propra afero sur tiuj forumoj, por atingi decidojn favore al Esperanto kiujn la ŝtatoj devus sekvi.

Tamen, la internaciaj instancoj ekrilatis kun ni ne por inviti nin persvadi ilin pri la boneco de Esperanto. Same kiel ni, ankaŭ ili deziras profiti de la rilato.

Kiel dirite de Mark Fettes, iama estrarano de UEA, ni devas partopreni la oficialajn forumojn por aŭdigi nian voĉon en la diskutoj pri paco, homaj rajtoj, kulturo kaj evoluigo kaj aliaj problemoj de nia tempo. Por havi ion por diri pri tiuj problemoj, ni devas diskuti pri ili ankaŭ sur niaj propraj forumoj, kaj poste raportu al tiuj institucioj pri la evoluo de niaj propraj diskutoj.

Nuntempe UEA kaj kelkaj landaj asocioj kiel la litova, kaj espereble aliaj, provas impulsi novan priesperantan rezolucion de UNESKO. Tia, kaj aliaj similcelaj iniciatoj kiuj aliras la eksterasocian publikon, povas kontribui al pli da rekono pri la valoroj de la lingvo kaj aparte al la batalo kontraŭ unulingva hegemonio.

En la kunteksto de la celebroy okaze de la Zamenhofa tago, la esperantistoj ne devas forgesi ke Zamenhof provizis nin je utila ilo por batali favore al la kultura kaj lingva diverseco en la mondo. Ni uzu ĝin kiel eble plej efike! MARITZA GUTIÉRREZ GONZÁLEZ

Universalaj Kongresoj: 100 jaroj de interkultura komunikado

El la raporto de Julián Hernández Angulo, prezidanto de KEA.

De la 23a ĝis la 30a de julio de 2005, okazis en Vilno, Litovio la 90a UK de Esperanto, kies temo estis "Universalaj Kongresoj: 100 jaroj de interkultura komunikado". Intervenis proksimume 2 340 esperantistoj el 61 landoj, inter kiuj Kubo kun du reprezentantoj. Maritza Gutiérrez, kasistino de KEA kaj UEA-estrarano pri landa agado; kaj Julián Hernández, prezidanto de KEA.

Ĝenerale la kongreso estis bone organizita kaj la kleriga kaj kultura programoj estis tre bonaj. Ni konstatis, ke la membroj de LKK faris sian plejblon, por ke la kongreso glato evoluu.

La komitato de UEA havis sian unuan kunsidon sabate posttagmeze, kaj laboris dum kvar horoj sub gvido de Renato Corsetti. Oni elektis tri komitatanojn C: Edvige Tantin el Italio, Phillipe Chavignon el Francio kaj Julián Hernández el Kubo.

Dum la kongreso, la komitato laboris en ok subkomitatoj rilataj al la jenaj temoj: Financo kaj Administrado, Kulturo, Edukado, Landa Agado, Faka Agado, Informado, Junularo kaj Eksteraj Rilatoj.

Dek prelegoj konsistigis la 58an sesion de la Internacia Kongresa Universitato. Ĝia rektoro estis prof. Aloyzas Gudavičius.

La kunsidon pri Landaj Asocioj kaj Regionaj Komisionoj partoprenis pli ol 60 geesperantistoj, aklivuloj kaj regionaj komisionoj de UEA. Raportis reprezentantoj de Kaliningrado, Rusio, Britio, Danio, Hispanio, Armenio, Brazilo, Nov-Zelando, Japanio, Israelo,

Kroatio, Kubo, Rumanio kaj Latvio. Aparte estis raporto pri la komisionoj de Ameriko, Oceanio kaj Azio. Mi raportis pri la agado de Kuba Esperanto-Asocio kaj pri nia plano okazigi la 95an UK-on en Kubo.

La kunsidon de la Amerika Komisiono partoprenis proksimume dek kvin esperantistoj. Ĝi estis gvidata de Atilio Orellanas. Oni parolis pri la daŭra kunlaboro inter la landoj de la regiono kaj pri la bezono disvastigi la movadon en aliaj landoj. Maritza esprimis, ke kubanoj pretas krei kondiĉojn por la ebla translokiĝo al Kubo de la oficejo de la komisiono. Julián informis pri la plano de KEA kontribui al la disvastigo de Esperanto en Karibio kaj en Centrameriko. Li dankis al Flandra Esperanto-Ligo, speciale al sinjoro Eddy Raats, la sendadon de komputiloj kaj aliaj materialoj al Kubo. Atilio esprimis, ke li enprotokoligos ĉion analizitan kaj sendos al la landaj asocioj de la regiono.

La kultura programo estis riĉa kaj varia. Dekomence la partoprenantoj ĝuis la Interkonan Vesperon, kiam muzikensemblo litova ludis plurajn muzikpecojn. Oni multe dancis. La Nacia Vespero estis bela kaj bunta; unue oni montris tradiciajn litovajn vestaĵojn kaj poste nacia dancensemblo brile kaj impone dancis. Pluraj artistoj kontribuis al la sukceso de la programo, inter ili: la grupoj Asorti, Akordo, la orkestro Sankto Kristoforo, la gekantistoj Eruda Li el Honkongo kaj Daniel Xavier Haddad. Shelter Sceno el Ser-

Interkultura komunikado en edukado

El la raporto de Julián Hernández Angulo, prezidanto de KEA.

Pli ol 50 esperantistoj partoprenis la konferencan okazintan en Kaŭnas. Ĝi okazis en universitata fakultato, kio multe kontribuis al la bona disvolvo de la programo. La unua programero estis la Interkona Vespero, kie kreigis tre bona etoso.

La festivaloj pri lingvoj okazis dimanĉe posttagmeze en la urbocentro por la ekstera publiko. Ĝi estis bonega aranĝo. Konferencanoj el diversaj landoj prelegis 25-minuto pri sia gepatra lingvo en kvar budoj muntitaj en centra parko. Kompreneble oni prezentis ankaŭ Esperanton. Multaj preterpasantoj alproksimiĝis kaj aŭskultis la prezentojn. Koruso de polaj infanoj bunte vestitaj kantis kaj dancis je la fino de tiu bela programero.

Dum la semajno, oni prelegis pri diversaj instruprojektoj kiel Interkulturo, Socrates, Modena, Bica, Ecole de Humanité, ktp. Maritza prelegis pri la nuntempa Kuba uni-

versitato kaj mi prelegis pri kiel sukcesigi la E-kursojn. Oni profitis la okazon, ke ni konferencis en universitato por organizi simpozion, kiun partoprenis instruistoj kaj profesoroj de esperanto kaj profesoroj de la fakultato. La prelegoj estis tre interesaj.

La komitato de ILEI sesiis dufoje dum la semajno. Oni aprobis la protokolon de la antaŭa kunsido, starigis novajn komisionojn kaj laborgrupojn, raportis pri la periodo januaro-junio 2005, aŭskultis raportojn de sekcioj kaj komisionestroj kaj aprobis la finanĉan raporton 2004 kaj la buĝeton 2006.

La konferencanoj ekskursis, bankedis, dancis, promenis tra Kaŭnas kaj alproksimiĝis iomete pli al la Litova kulturo. Ni vizitis la esperantistandan domon en la Zamoniho-fa strato. Reprezentantono de la urbestro akceptis kelkajn konferencanojn en la urbo-domo.

- ◀ bio prezentis la komedion *Kiel mortigi sian edzinon* de la itala aŭtoro Antonio Amurri. La fama kroata aktorino Vida Jerman ludis scenon el la teatraĵo *Judita* dum la Internacia Arta Vespero. Oni prezentis ankaŭ la teatraĵojn *Litovio* de Barbora, *Usono en banejo* kaj *Familia Etoso*. Mi ankaŭ kantis en diversaj lokoj dum la kongresa semajno. Oni invitis min partopreni koncerton de la Internacia Koruso, kie mi kantis sep el miaj kantoj, poste mi kantis en la Internacia Arta Vespero.



Kutimaj eraroj de kubanoj parolante Esperanton

Teksto de la prelego de Norberto Díaz Guevara, ĝenerala sekretario de la provinca E-filio en Sancti Spiritus, dum la 5a Kongreso de Kuba Esperanto-Asocio okazinta en Havano de la 3a ĝis la 6a de marto 2005.

Enkonduko

En tiu ĉi prelego mi pritraktos la plej ĝeneralajn kaj oftajn erarojn de la Kubaj Esperanto-parolantoj, kaj iliajn rilatojn kun la hispana lingvo. Surbaze de la difinoj en *La Nova Plena Ilustrita Vortaro*, (PIV2) kaj en *Plena Analiza Gramatiko*, (PAG) estos pruvitaj la eraroj, kaj aperos la ĝusta(j) formo(j) por esprimi la koncernan ideon.

La ĉefa celo de mia interveno estas stimuli la pluan lernadon de Esperanto ne nur en la komencanta medio sed ankaŭ en la kazo de prezentantoj.

1. ĈIUJ ((LA)) HOMOJ

Jen unu el la plej kutimaj kaj simplaj eraroj, kies bazo troviĝas en simila konstruo hispanlingva (*todos los hombres*). La familia formo facile prenas lokon en nia ĉiutaga parolo.

La artikolo (*la*) estas la ĉefa rimedo por determini substantivon en Esperanto. (PAG).

Ĉiu. Morfemo uzata 1. (singulara aŭ plurala) kiel determinanto de substantivo... (PIV2)

El tio eblas konkludi, ke laŭ la Principo de Necesito kaj Sufiĉo, en la koncerna frazo la unuaj du vortoj ekskludas sin reciproke.

la. Partikulo (t.n. artikolo), uzata antaŭ subst., por montri ĝian antaŭan menciton (aŭ ĉar la priparolata persono aŭ objekto estas jam konata de la alparolanto, aŭ ĉar oni parolas pri la tuta speco). Rim. 1. Oni

ne uzas *la* (...), nek apud **ambaŭ**, **ĉiuj**, **kies**, **kiuj** jam enhavas ideon de difiniteco (...).

Tiu PIV-difino klare atentigas pri la eraro.

Resumo:

El la supra analizo konstateblas, ke la ĝustaj formoj estas, ekzemple:

- ĉiuj** homoj devas pace vivi
- ĉiuj** esperantistoj ĉeestantaj la kongreson
- oni bone purigu ĉiujn seĝojn

Ĉar la apero de la artikolo **la** inter determinanto de substantivo kaj substantivo konsistigas klaran eraron en la frazo. Laŭ la kunteksto eblas uzi **la** anstataŭ **ĉiuj**.

Plej ofte la eraro aperas kiam la determinanto de substantivo havas pluralan formon.

2. RAPIDE / BALDAŬ

Konfuzo inter **ambaŭ** vortoj estas ofta en nia parolo, kio devenas de la same kutima formo de la ekvivalentoj en la hispana lingvo.

- jam mi foriras, sed mi revenos **rapide** (kurante / per aviadilo!)
- ne lasu lin sola: venu **rapide** (kurante, sed eble post jaroj!)

En tiaj frazoj ni preskaŭ ĉiam uzas **rapide**, kvankam ni celas alian signifon.

rapide (PIV/PIV2): *En rapida maniero*

- nu, iru pli **rapide**
- malpiulo **rapide** malaperas

- c) kiu donas **rapide**, donas duoble
 ĉ) **rapide** iras la vortoj, sed ne **rapide** la fajroj
 d) **rapide** kreski, kiel fungo
 e) la sciigo **rapide** diskoniĝis

baldaŭ (PIV2): Cirkonstanca morfemo signifanta "post paso de nur iom da tempo" / (PIV): Adverbo signifanta "post paso de nur iom da tempo" {post nelonge}

- a) falis gutoj post gutoj, kaj **baldaŭ** fariĝis vera pluvego
 b) la lacigita cigno estis la lasta en la vico, kaj **baldaŭ** ĝi restis je granda distanco malantaŭe
 c) se via formo estas efektive bona, ĝi **baldaŭ** trovos multajn amikojn
 ĉ) la suno, kiu estis **baldaŭ** subironta
 d) publikigu la proponon kiel eble plej **baldaŭ**

Mi klopodu fari la aferon pli klara: **rapide** rilatas al la tempodaŭro de okazaĵo, dum **baldaŭ** rilatas al la tempo inter du okazaĵoj.

Naĝado de sportisto

(mal)**rapide**

La sportisto **rapide** aŭ **mairapide** naĝas.

frapado _____ malfermo
 de pordo _____ de pordo

(mal)**baldaŭ**

Post la frapado de la pordo de nia domo, ni **baldaŭ** aŭ **malbaldaŭ** malfermos ĝin

Tiel estas, ke uzante unu aŭ la alian vorton en la subaj frazoj, la signifo aliĝas:

- a) ni esperas, ke vi **baldaŭ** / **rapide** kantos (**rapida** kanto eble estos nekomprenebla)
 b) aĉetu la ovojn kaj venu **rapide** / **baldaŭ** (se **rapide**, la ovoj povus rompiĝi)
 c) la aviadilo **rapide** / **baldaŭ** flugos (se **baldaŭ** ne estos tro da pasaĝera atendado)

Plia detalo estas, ke **rapide** respondas al la demandvorto kiel, dum **baldaŭ** konsistigas paron kun kiam.

Resumo:

Por esti certa pri la signifo de la frazo, ni anstataŭu la koncernajn vortojn per sia ekvivalenta frazo: **rapide** = en mallonga tempo **baldaŭ** = post ne longe

Konstruoj kiaj *la aviadilo **baldaŭ rapide** flugos kaj la patro **baldaŭ rapide** skribos leteron al la filo*, povus esti ŝokaj unuavide, sed ili estas tute korektaj.

3. STATUTO ((J))

Jen vorto vaste uzata kaj plej ofte dum niaj komitatkunsidoj. Ne estas sekreto por ni, ke la ekvivalenta hispana vorto apartenas al la ĝenerala uzo; tiel, plurale.

statuto (PIV2): *Fundamenta regularo de asocio, kompanio aŭ alia organizaĵo.* / (PIV): *Fundamenta regularo de asocio, societo aŭ alia organizaĵo*

- a) modifi la **statuton**
 b) statregistrita **statuto** de komerca societo (*kompanio* en nova PIV)

Indas aldoni, ke tiu vorto estas fundamenta, kaj ĝi estis unufoje uzita de Zamenhof.

Resumo:

Estas klare, ke asocio povas havi nur unu **regularon**, t.e. **statuton**; do, ni devas uzi ĝin singulara. Ni klopodu estonte paroli pri la **statuto** de Kuba Esperanto-Asocio.

- a) estu respektata la **statuto** de la asocio
 b) en la Centra Oficejo de UEA estas la **statutoj** de ĉiuj landaj asocioj

4. KOMENCI / FINI

Tiu paro de verboj estas fonto de multaj misparoloj, ĉar ni ne bone atentis pri la gramatikaj detaloj de tiuj vortoj. Ili estas transiti-

vaj. Tamen, la hispana ekvivalenta paro estas uzata transitive kaj netransitive en la sama morfologia formo, kaj el tie venas la negativa influo.

komenci (PIV/PIV2): (tr)

1. Fari la unuan parton de afero aŭ ago
 - a) **komenci** konstruon
 - b) li **komencis** sian paroladon per sonoraj frazoj
2. Transiri en novan staton
 - a) mi **komencis** maljuniĝi
3. Konsistigi la unuan parton de io
 - a) tiu vorto **komencas** la frazon
 - b) la verso (versiklo, nova PIV), kiu **komencas** la Biblion

fini (PIV/PIV2): (tr)

1. Ĉesi fari; ne daŭrigi plue ian agon
 - a) li **finis** beni
 - b) ...mi **finos** legi la tutan libron en du tagoj
2. Konduki ian aferon ĝis la punkto aŭ tempo, kiam ĝi estas kompletigita
 - a) kiam mi **finos** mian laboron, mi serĉos mian horloĝon
 - b) ...por ke ni povu **fini** la aferon kun la kontrakto
 - c) **fini** sian vivon
3. Uzi ion kiel finan parton de ago
 - a) komenci per Dio kaj **fini** per diablo
 - b) per tio mi **finos**
4. Konsistigi la lastan parton de io
 - a) komuna kantado **finis** la kunvenon
 - b) tiu konkludo **finas** inde vian paroladon

Estas klare, ke por uzi tiujn verbojn en netransitiva formo necesas aldoni la sufikson **iĝ**. Jen pliaj ekzemploj de PIV:

komenciĝi (PIV2): *iĝi komencita, eniri en sian unuan parton:*

- a) **komenciĝis** la milito

- b) kio **komenciĝis**, tio ankaŭ **finiĝos**
- c) putrado de fiŝo **komenciĝas** de l' kapo
- ĉ) la nomoj de la leporo kaj de la limako **komenciĝas** per L.

finiĝi (PIV2): *ĉesi*

- a) kiam **finiĝis** tiu jaro
- b) nun **finiĝas** mia klereco
- c) kio komenciĝis, tio ankaŭ **finiĝos**
- ĉ) **finiĝanta** vivo, ceremonio, epoko, eklipso

Resumo:

- a) li **komencis** sian paroladon... / lia parolado **komenciĝis**
- b) kiam mi **finos** mian laboron... / kiam mia laboro **finiĝos**

5. ATENTI / ZORGI

En tiu ĉi kazo la korespondaj hispanlingvaj vortoj estas pli proksimaj inter si, kaj la negativa influo venas el tio, ke la hispanlingvaj ekvivalentaj vortoj estas ofte uzataj kun ambaŭ signifoj.

atenti (PIV2): (tr)

1. Teni siajn vidon, aŭdon kaj intelekton (PIV2: spiriton) fiksitaĵ al io
 - a) **atentu** la vorton kaj komprenu la vuzion
 - b) la juna vidvino eĉ ne **atentis** lian ĉeestadon
 - c) **atentu** la vojon, laŭ kiu vi iras
2. Vigle uzi siajn sensojn kaj menson (PIV2: spiriton) por eviti ion
 - a) **atentu**, ke vi ne falu!
3. Rigardi ion kiel gravan
 - a) **atenti** konsilon, argumenton

zorgi (PIV2): (ntr)

1. Serioze direkti sian atenton kaj agadon (PIV2: aktivecon) al ies bono

- a) mi **zorgas** pri si tie!, kiel mi zorgas pri mi mem...
 - b) pli **zorgas** unu patrino pri dek infanoj, ol dek infanoj pri unu patrino
 - c) **zorgu** pri vi kaj nenion pli (prigardi, flegi, varti)
2. Apliki sian atenton, ke ago estu bone plenumita
 - a) la celo de nia gazeto estas zorgi pri la vastigado de la lingvo {okupiĝi}
 3. Maltrankviliĝi pro necerteco aŭ dubeco de io, kion oni opinias grava
 - a) havu la bonecon ne **zorgi**, li atendos!
 - b) la malsato, pri kiu vi **zorgas**, persekutos vin
 - c) lingvo natura tute ne bezonas **zorgi** pri facileco
 4. Konscience fari, plenumi (taskon, ktp)
 - a) **zorgu** vian melion, kaj ne miksu vin en alian
 - b) faru vian aferon, Dio **zorgos** ceteron

La dua difino de **atenti** klare indikas, ke oni diru:

- a) **atentu** la biciklon! (kamionon, trajnon ktp)
- b) **atentu!** Venas biciklo

Resumo:

Komparu la jenajn frazojn laŭ la vorto uzata:

- a) **atenti** / **zorgi** teatraĵon
- b) **atenti** / **zorgi** paroladon
- c) **zorgu** pri la biciklo (purigu ĝin, riparu ĝin ktp)
- ĉ) **atentu** la biciklon (**zorgu** pri vi, ĉar biciklo povos vin vundi!)

6. BEZONI / NECESI

La konfuzo venas el la uzo de **necesi**. La radiko estas adjektiva, do, la verbigo signifas **esti necesa**. Jen kio aperas en PIV.

bezoni: (tr)

1. Suferi je manko aŭ nesufiĉa havo de io, kion postulas la fizika vivo
 - a) **bezoni** nutraĵon
 - b) honoro ne donas, kion stomako **bezonas**
 - c) mi **bezonas** dormi
2. Ne posedi ion konkretan, kies manko genas
 - a) iaj ĝesinoroj **bezonis** por sia kuirejo kelke da seĝoj
 - b) ni ekstreme **bezonas** plenan vortaregon
 - c) ne la sanuloj **bezonas** kuraciston
3. Ne povi atingi sian celon aŭ destinitecon sen la ekhavo de io abstrakta
 - a) ni antaŭ ĉio **bezonas** plej severan unuecon
 - b) la klasikaj verkistoj ofte **bezonas** komentariojn
 - c) granda ŝipo **bezonas** profundecon

necesa (PIV2):

1. Tre bezonata, preskaŭ ne malhavebla, ekstreme dezirata
 - a) memorkapablo estas **necesa** por bona lemanto
 - b) por vendisto mensogo estas **necesa** apogo
 - c) **necesa** estas via ĉeesto en la kunsido
2. Postulata de la naturaj leĝoj aŭ de la stato de la aferoj; absolute neevitebla
 - a) la varmo estas **necesa** efiko de la fajro
 - b) la acro estas **necesa** por ĉiuj vivantaj estaĵoj
 - c) la artikolo (en E.) estas oportuna, sed ne **necesa**
3. Ne povanta esti alia, aŭ ne esti
 - a) **necesa** sekvo de principo

necesi (PIV2): *Esti necesa*

En la sep supraj ekzemploj por la uzo de **necesa** eblas en kelkaj anstataŭi tiun vorton per est(i) **necesa**, tiel, ke ni havas: "memorkapablo **necesas** por bona lernanto", "la aero **necesas** por ĉiuj vivantaj estaĵoj".

Resumo:

Estas malkorekte anstataŭi **bezoni** per **necesa** (kaj inverse), en frazoj kiel:

- Mi **bezonas** la ŝlosilon por malfermi la pordon
- La novaj lernantoj **bezonas** vortaron
- Necesas** (estas necese) multe da akvo por la kultivoj
- Ni ĉiuj scias, ke la suno **necesas** (estas necesa)

7. DE LA 23A((N)) ĜIS LA 28AN DE MAJO

Tiu ĉi eraro estas videbla pli ofte en skriba formo, kaj lernas pri simpla malatento de la tria uzo de akuzativo: anstataŭo de prepozicio.

Je la 10a de marto 2004 = la 10an de marto 2004, ĉar la akuzativa finaĵo "n" anstataŭas la prepozicion "je". Do, la transkribo de la erara frazo estus: de je la 23a ĝis la je 28a de aprilo, kio estas fakte malkorekta.

Resumo:

Jen ekzemploj de korekta uzo:

- la 8a de marto estas grava tago
- la 6a TAKE okazis de la 21a ĝis la 27a de marto
- Zamenhofo naskiĝis la 15an de decembro 1959
- la kongreso komenciĝis la 3an de marto
- hodiaŭ estas la 4a de marto 2005

8. ALIA / PLIA

Ni komencu per la difinoj de PIV2:

alia: 1 Ne la sama, kiel iu aŭ iuj jam menciita(j), ne identa kun: *transportu la seĝon de ĉi tio sur alian lokon; skatolo aŭ alia objekto; kelkaj aliaj ekzemploj*. 2 Diferenca per unu aŭ pluraj ecoj: *tio estas tute alia afero; la rezulto estis tute alia; ol ni esperis, nun sia rideto estis alia, ol matene*. 3 Dua el du personoj, objektoj aŭ grupoj: *la lingvo transiradis de unu homo al alia nur per la orelo; krei malamon inter unu gentoj kaj aliaj*.

plia: estanta plia; aldona: *unua plia mortis; jen plian komplezon mi petas de vi*.

El tio eblas konkludi, ke okaze de drinkado, oni prefere petu **plian** kaj ne alian bieron, ĉar la kelnero certe ŝanĝos onian bieron!

Resumo:

- Situacio: Vi jam elektis libron en Libroservo, sed vi interesiĝas pri kroma verko. Se vi diras: *Mi volas alian libron* la vendisto certe prenos la de vi jam elektitan, kaj ĝin anstataŭigos per alia. La ĝusta eldiro estus: *Mi volas plian libron*.
- Ĉu venis la homo vestanta ruĝan ĉemizon? Ne, venis **alia**.
- Ĉu venis la viro nomata Karlo? Ne, venis **alia**.
- Ĉu venis la virino nomata Delja? Jes, kaj venis **plia** samnomata virino.

9. TRA

Jen mallonge la PIV2-difinoj:

tra. 1. Prep. signifanta: 1. ke movo komenciĝas ĉe unu ekstremo kaj **atingas la alian**; *iri tra koridoro*. 2. ke movo, komenciĝinte antaŭ iu loko paŝas en tiun lokon kaj daŭras pluen: *tra unu orelo ĝi eniras, tra la dua ĝi eliras*. 3. ke la ago daŭras la tutan tempon ekde la komenco: *la koku krias tra la tuta nokto*.

Surbaze de tio, la ĝusta eldiro estas: *estis invititaj la membroj de la diversaj filioj en la lando*, kaj la ofte aŭdebla konstruo *estis invititaj la membroj de la diversaj filioj tra la lando* ne estas korekta.

10. AERO / VENTO

En la hispana oni kutime diras "estas tro da aero" [hay mucho aire], kiam temas pri notinda fluo de la aero, do, **vento**.

Pro tiu influo, la konstruo en Esperanto estas erara, kaj ni foje aŭdas: *estas foria aero*.

La unuaj tri difinoj de PIV2 asertas, ke **aero** estas *gaso*, kaj la du sekvaj difinoj nomas ĝin *spaco*. En la kazo de **vento**, la difinoj nomas ĝin *aerfluo*.

Resumo:

Okaze de uragano, la aero estas la sama, sed la fluado de tiu aero estas ja forta. Do, ni povas ĝuste komenti: *estas foria vento!*

11. (PREOKUPIĜI)

Tiu vorto ofte aŭdiĝas el parolanto, kiu fakte celas **zorgi**. La vorto estas hispanaĵo, tute ne ekzistanta en PIV.

KELKAJ FONETIKAJ ERAROJ

Mi volas ĉi-foje mencii kelkajn prononcerojn, kiuj ofte frapas la orelojn. En la Kuba medio ili plejofte ne estas notindaj, ĉar ni

kubanoj bone konas nian prononcon, kiu senŝanĝe iras al Esperanto. Tamen, indas kaj endas resti atentaj por eviti ilin.

1. Tagmanĝo / takmanĝo

Laŭ PIV2, **taki** estas prepozicio kun la signifo *rapida* (*takigrafo*, *takikardio*). Nu, se vi vere disponas je malmulte malmulte da tempo, vi petu *takmanĝon!*

2. Kvin / vin – Mi volas (k)vin – Mi volas dek (k)vin

Kia fariĝus la etoso, se bejulino vendas glaciaĵon, kaj via antaŭtulo en la vico petas al ŝi unu, kaj vi diras *mi volas dek vin?* Mi aldonu pli da danĝero al la situacio per la proksima ĉeesto de la forta fianĉo!

3. Mi estas laca / laksa nun

Nu, eblas kompreni, ke ellegado de la tuta PIV estas laciga okupo, sed ĉu tiu laboro estus *laksiga?*

4. Kompreni / konpreni

konpreni = preni konon

5. Ĉu vi scias? / Ĉu vi cias?

Faciligas la prononcon la kuntligado de la literoj: ĉu vi scias = [ĉu vi-stias].

Resumo:

La fonetikaj eraroj estas tre variaj, kaj ne la samaj en diversaj vortoj. Pro tio necesas bone atenti, ke ĉiuj literoj en Esperanto havas sian prononcon, kiun ni devas respekti, por ke la lingvo bele fluu kaj estu komprenata de ĉiuj siaj parolantoj.

Kara leganto: Ĉu vi jam pagis vian kotizon por 2005? Baldaŭ venos 2006!

Ŝtonoj... diamantoj... mondo... feliĉo...

Iam homo marŝis tra strando dum plenluna vespero.

Li pensis tiel: "Se mi havus novan aŭtomobilon, mi estus feliĉa; se mi havus grandan domon, mi estus feliĉa; se mi havus bonegan laboron, mi estus feliĉa; se mi havus perfektan paron, mi estus feliĉa", kiam li subite piedbatis saketon plenan da ŝtonoj.

Li komencis ĵeti ŝtoneton post ŝtoneton en la maron dirante: "mi estus feliĉa se mi havus..."

Tiel li faris ĝis kiam nur restis unu ŝtoneto en la saketo, kaj tiun li decidis gardi.

Alveninte hejmen, li rimarkis ke tiu ŝtoneto fakte estis tre valora diamanto.

Ĉu vi imagas kiom da diamantoj li ĵetis en la maron ne pensante kion li faris?

Tiaj estas homoj; ili ĵetas siajn belegajn trezorojn esperante kion ili kredas perfekta aŭ revante kaj dezirante kion ili ne havas, sen valorigi kion ili havas ĉemane.

Se ili rigardus ĉirkaŭen kaj haltus por observi, rimarkus kiom bonŝancaj ili estas.

Tre proksime al ili estas ilia feliĉo.

Ĉiu ŝtoneto devas esti rigardata – aŭ povas esti – valora diamanto.

Ĉiu el niaj tagoj povas esti konsiderata belega, valora kaj neanstataŭebla diamanto.

Dependas de ni profiti aŭ ĵeti ĝin en la forgesantan maron sen rehavi ĝin neniam.

Kaj vi, kiel vi ĵetas viajn ŝtonetojn, kiuj povas esti gefianĉoj, goamikoj, laboro, eĉ viaj propraj revoj?

La mondo kuŝas en la manoj de tiuj kiuj havas kuraĝon revii kaj riski vivi siajn revojn.

Esperantigis: JULIÁN HERNÁNDEZ ÁNGULO

Atingitaĵoj

Iru serene tra la bruo kaj la hasto, kaj memoru kiom da paco povas enesti silenton. Tiom, kiom eblas, ne cedanta, daŭrigu bonajn rilatojn kiun ĉiuj homoj. Parolu trankvile vian veron, kaj aŭskultu aliulojn, eĉ la tedaj kaj la sensciulaj ankaŭ havas siajn spertojn. Evitu homojn laŭtajn kaj agresemajn; ili ĝenas je la spirito. Se vi juĝas vin kompare al aliuloj, vi riskas iĝi vanta kaj amara, ĉar

ĉiam estos uloj pli kaj malpli eminentaj ol vi mem.

Ĝuu viajn atingitaĵojn, ne nur viajn planojn. Restu interesita de via kariero, iom ajn modesta; ĝi estas vera posedaĵo dum la ŝanĝiĝantaj fortunoj de la tempo. Praktiku singardon en viaj negocaj aferoj, ĉar la mondo estas plena je ruzuloj. Sed ne permesu, ke tio ĉi blindigu vin al la virto ja ekzistanta; multaj homoj strebas por noblaj idealoj, kaj ĉie la vivo estas plena je heroeco. Estu vi mem. *Esperantigis:* CHRISTOPHER HOOLEY

Famaj frazoj

Kolektis: NORBERTO DIAZ GUEVARA

*Bona ĵurnalo estas lando
parolanta al si mem.*

Arthur Miller

*La sekreto de la feliĉo ne estas fari
kion oni volas, sed ami kion oni faras.*

León Tolstoj

*La kvalito nuniam estas akcidento;
ĝi ĉiam rezultas el inteligenta penado.*

John Ruskin

La amo postulas, la amikeco fordonas.

Anonima

*Nia diligenta kolegaro
en laboro paca ne laciĝu.*

Zamenhof

*La vorto utilas ne por kaŝi la veron,
sed por ĝin diri.*

José Martí

La venkanto

Kolektis: NORBERTO DIAZ GUEVARA

La venkanto estas parto de la solvo
de problemo.

La malvenkanto estas parto de la
problemo.

La venkanto ĉiam havas programon.

La malvenkanto ĉiam havas
senkulpecon.

La venkanto diras: *Lasu min tion fari.*

La malvenkanto diras: *Tio ne estas mia
tasko.*

La venkanto ĉiam trovas solvon por
problemo.

La malvenkanto ĉiam trovas problemon
por solvo.

La venkanto vidas rozon en ĉiu domo.

La malvenkanto vidas plurajn domojn
apud rozo.

La venkanto diras: *Tio certe malfacilas,
sed eblos.*

La malvenkanto diras: *Tio eblos,
sed certe tro malfacilas.*

Ĉu vi scias, ke...

Kolektis: NORBERTO DIAZ GUEVARA

...la kuba intelektulo d-ro Fernando Ortiz faris meritan laboron por la diskonigo de Esperanto en nia lando, en la komenco de la antaŭpasinta jarcento? ...la nuna Kuba Esperanto-Asocio (KEA) fondiĝis la 16an de junio 1979? ...la centra oficejo de KEA malfermiĝis la 3an de januaro 1983? ...la unua tutlanda kongreso de KEA okazis en Havano en decembro 1987, kun interveno de 600 kubaj delegitoj kaj kelkaj eksterlandanoj, inter kiuj Simo Milojević (Nederlando), Ĝenerala Direktoro de UEA, d-ro Otto Haszpra (Hungario), estrarano de UEA, d-ro Detlev Blanke (GDR), sekretario de CDREA kaj s-ro Marin Bacev, jam forpasinta E-instruisto el Bulgario? ...*Avanco* naskiĝis la 16an de junio 1989, okaze de la deka datreveno de KEA? ...la 75a Universala Kongreso okazis en Havano, de la 14a ĝis la 21a de julio 1990? ...KEA translokiĝis al la nuna sidejo en Havano la 17an de julio 1991?

Kiel altigi la propran lingvan nivelon?

Prelego de Marta Alonso, KEA-estrarano pri instruado, dum seminario pri aktivula trejnado, en Havano, 21a-22a de majo 2005

Unue mi diru, ke la esperantistoj, kiuj volas altigi sian lingvan nivelon, havas rimedojn por tion atingi, sed la plej grave estas, ke ili havu la volon fari tion.

Hodiaŭ mi pritraktos temojn, kiujn mi konsideras gravaj por tiu celo. Estas diversstipaj kursoj kaj la esperantistoj povas laŭvole partopreni en ili.

Regula kurso

Eblas ĉeesti la preferatan kurson, kaj tiel refreŝiĝos la konoj. Ĉiuj instruistoj estas pretaj helpi vin rilate dubojn.

Korespondanta kurso

Ĉu maleblas al vi ĉeesti regulan kurson? Je via dispono estas lernomaterialoj, kiujn vi povas aĉeti, kaj tiel refreŝigi la konataĵojn aŭ unuafoje konaliĝi kun la lingvo.

Distanca kurso

Pri tiu kurso respondecas Pedro Fernández kaj Marta Alonso. La unua paŝo estas ekzameniĝi, por ke ni konu kiuj estas viaj lingvaj malfacilaĵoj. La postaj ekzercoj celos la forigon de tiuj eraroj.

Nuntempe partoprenas la kurson la membroj de la Turisma Grupo en Urbo Havano, plus dek esperantistoj el Bajamo kaj unu el Santiago de Kubo. Por aliĝi kontaktu la respondeculojn.

Plia tre bona rimedo estas **memlernado**. Al tio apartenas laŭlegado de bonaj

tekstoj kiel *Karlo*, *Gerda malaperis*, *Faktoj kaj fantazioj*, *Kumeŝaŝa*, *la filo de la ŝanĝalo*, *Fabeloj de la verda pigo*. Gravaj revuoj estas *Esperanto*, *Juna Amiko*, *Kontakto*, kiuj estas ricevataj de pluraj esperantistoj. Ĉiutaga legado de esperantaj materialoj nepre alligas la lingvan nivelon.

La partopreno en Esperanto-aranĝoj estas grava por praktiki la lingvon. Eventualaj kaj foje abundaj eraroj en la komenco povus okazi, sed iom post iom konstatablos la pliboniĝo de la lingva nivelo. Ne necesas esti elstara esperantisto por partopreni: serioza parkerigo de teksto, kiun oni prezentos al la publiko, utilas por la lingva alproprigo.

La plenumo de la ekzercoj de la unua kaj dua niveloj estas bona metodo por lingve kapabiliĝi, kaj post kontrolo fare de la instruisto, relegado de la respondoj firmigos la konataĵojn.

Verkado de rakonto pri temo bone konata, korespondado surbaze de korespondpetoj kutime aperantaj en preskaŭ ĉiuj E-gazetoj, estas pliaj bonaj metodoj por praktiki la lingvon.

Troveblas pluraj rimedoj, sed mi esperas, ke la ĉi tie proponitaj helpos vin fariĝi ĉiam pli lingve kapabla esperantisto.

Pluraj eventoj atendas nin en la estonteco. Ni profitu ilin.

Viaj komentoj pri la temo estas bonvenaj.

SAEST 2006

**Per la sciencoj al esperanto...
per esperanto al la sciencoj!**

La Seminario pri Apliko de Esperanto en Scienco kaj Tekniko, okazos la 19an kaj 20an de majo, kaj ĝi sesios per prelegoj kaj afiŝoj. Ĉiu prelegonto disponos je 20 minutoj.

Temaro de la Seminario:

- Lingvistikaj aspektoj de Esperanto.
- Esploroj rilate la instruadon de la Internacia Lingvo.
- Apliko de Esperanto en ĉiuj sciencaj kaj teknikaj branĉoj.
- Esperanto kaj Medicino.

Kiel aliĝi?

Interesitoj bonvolu sendi resumon antaŭ la 28a de februaro 2006. La prelegon mem oni sendu antaŭ la 30a de aprilo tajpitan aŭ en komputildiskedo.

Aliĝkotizo estas CUP 30.00 kaj CUC 20.00 por kubanoj kaj eksterlandanoj respektive. Tamen, estonte ni informos pri oferto inkluzivante aliĝkotizon por tuteŝemajna restado kun matenmanĝo kaj kroma manĝo.

Limdato: la 30a de marto 2006

Se vi bezonas retroprojekciilon aŭ aliajn ilojn bv. informi al la Nacia Sidejo antaŭ la 30a de aprilo.

Kien sendi la resumojn?

Prelegojn kaj resumojn oni transdonu on aŭ perpoŝte sendu al:

Kuba Esperanto-Asocio

Stratadreso: Vista Alegre 264 entre Juan B. Zayas y Luz Caballero, Diez de Octubre, Ciudad de La Habana / Poŝtadreso: Apartado 5120, CU-10500 Ciudad de La Habana

Korekto:

En la artikolo "Kongresoj kaj kongresanoj" aperinta en la pasinta numero, en la dua alineo aperis: *Ili, do, estas nepra parto de kongreso, kies planita programo povas esti bunta kaj tamen la 5a Kongreso de Kuba Esperanto-Asocio havis varian kaj abundan programon por 104 kongresanoj.* Devas esti: *Ili, do, estas nepra parto de kongreso, kies planita programo povas esti bunta kaj tamen malsukcesa pro manko de aliĝintoj. La 5a Kongreso de Kuba Esperanto-Asocio havis varian kaj abundan programon por 104 kongresanoj.* La redakcio pardonpetas al la aŭtoro kaj al la legantoj.

Esperanto en Kubo

- Historio de la Kuba movado
- Kalendaro de eventoj
- Radio Havano-Kubo
- Julio Mangada Roseñorn
- Fotogalerio
- ... kaj multon pli vi trovos!

<http://www.esiss.co.cu/esperanto/jajabokubo.htm>

AVANCO

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO

Kuba Esperanto-Asocio

Poŝtfako 5120, CU-10500 Havano, Kubo

Telefonj: +53(7)40 4484; Fakso: 649 8729

avanco@esperanto.co.cu

Ciferecigis: Javier Ramos
@Radioamatoro